


En nia tre bunta komunumo estas facile foje fari mispaŝojn kaj senintence ĝeni aŭ ofendi aliulojn.

Interkompreno ne efektiviĝas nur pere de komuna lingvo.

Empatio helpas rigardi la mondon el alies perspektivo kaj respekte lerni pri kio estas fremda al ni. Identecoj kaj etikadoj estas tre persona afero, kaj ne estas afable kontesti ilin.




Ne ĉiuj homoj ŝatas fizikan kontakton kaj certe ne ĉiuj en la sama maniero.



Aldone, kelkaj tipoj de kontakto estas malsimile komprenitaj en malsamaj kulturoj.

Pensu pri tio kiam vi interagis kun aliaj homoj, ĉefe kiam vi ne konas ilin tre bone.



Same, ne ĉiuj homoj deziras esti fotataj. Demandu al la fototoj, ĉu vi rajtas foti ilin, kaj aparte zorgu havi ilian permeson, kiam vi intencas publikigi la fotojn (ekz. en sociretejoj aŭ gazetoj).

Konsento moĵosas!
Kaj gravas ke ĝi estu klara, pripensita, memvola kaj revokebla. Homoj ebriaj, dormantaj, aŭ en alia malforta kondiĉo ne povas konsenti.



Se vi spertas diskriminacion, perforton, ofendon, aŭ alispecan ĝenadon dum la evento, estas enorde reagi al ĝi.

Tiuflanke vi ne estas sola: okaze de bezono vi ĉiam povas paroli kun la organiza teamo.

